

# Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto  
**125**  
somero 2021



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

## federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

## nia federacio sur Facebook

[http://www.facebook.com/  
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

## prezidanto

Pierre Oliva  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
nlpolecamp@gmail.com

## aliĝkoto (kun la gazeto)

**6 €**

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la kasisto  
Nicole Lafitte  
(ĉe la supra adreso de  
Pierre Oliva)

## sekretario

### redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain  
48 avenue Alexis Godillot  
83400 Hyères  
06 42 19 68 51  
pascalvilain83@gmail.com

### limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°

**25-a de septembro 2021**

bonvolu sendi al la supra retadreso

><<>

antaŭdankojn pro viaj kontribuaĵoj

## Vorto de la Prezidanto

Finfine kaj plezure, ni rekomencis labori preskaŭ normale: okazis la 21an de junio la unua komitatkunsido de nia federacio depost pluraj monatoj, kaj ĉiuj partoprenantoj ĝojis pri tio, ĉar ĝis nun nur telefon-alvokoj kaj rekontaktoj ebligis la devigajn taskojn...

Mi esperas, ke ni povos partopreni en la septembraj foiroj de asocioj, kaj ke la kursoj ree funkcios senprobleme. Mi havas saman esperon pri la staĝo en le Beausset, kiu devus okazi la 27an kaj 28an de novembro. La projektoj ne mankas... decidis pri ili la evoluo de la pandemikrizo.

Intertempe, havu agrablajn feriojn kaj ripozmomentojn, antaŭ ol trovi la vojon al kursoj, lingvo-kafejoj, staĝoj, kongresoj...

*Pierre Oliva*



## enhavo

2	iompostioma retrovo de normala vivo	8	Provencaĵoj esprimas sin... pentre aŭ fote
5	vojaĝemaj (kaj laboremaj!) samfederaciaĵoj	10	ZEO-oj en PACA Esperanto-Poŝtkruciĝo
6	diversaĵoj	11	paĝo de la komencantoj
7	Federaciaĵoj esprimas sin... skribe...	12	agendo
+	reta suplemento pri Reunio		

## Iompostioma retrovo de normala vivo...

Dum multaj monatoj ne plu povis okazi klubaj renkontiĝoj kaj kursoj, staĝoj, kongresoj, Esperanto-kafejoj... Multo tamen okazis rete. Kelkaj esperantistoj, danke al retaj video-serviloj, havis eĉ pli da kontaktoj ol kutime. Gravaj eventoj okazis kaj plu -as aŭ -os nur rete: la Universala Kongreso 2020 kaj la venonta de 2021, la kongresoj de SAT, TEJO, ILEI...

Sed tio ne povas daŭri tro longe; multaj sopiras je rapida renormaliĝo de la Esperanta vivo.

Iom post iom, ĉi tiu revenas.

Jen kronologie kio okazis en niaj PACA-regiono kaj Provenca federacio.

### 27-a de majo: Esperanto-kafejo en Hyères



Ĉar nia kutima loko ĉe la lastetaĝa teraso de la hotelo Ibis ne povis akcepti nin fine de majo, ni decidis kunveni en alia urbocentra trinkejo. La teraso ne estis ideala por vera diskuto: iom tro laŭta muziko, proksimeco de aŭtomobiltrafiko, longa tablo malebliganta konversaciojn inter ĉiuj... sed ne gravas: ni ege ĝojis povi denove renkontiĝi.

Ĉu la pandemio perdis al ni kelkajn komencantojn de Hyères? Tion ni rajtas supozi kaj timi, ĉar venis nur du paroj de la urbo, Simone kaj Charles, Mari-Roza kaj Pascal, al kiuj feliĉe aldoniĝis Maria kaj Christian, el Pignans, Nicole kaj Pierre, el Le Beausset, kaj Alain el Toulon.

### 29-a de majo: amika kunveno en Hyères

De la 1-a numero (januaro 2000) ĝis la 12-a (marto 2005), mi redaktis lokan esperanto-gazeton: La Dunkirkan Stelon.

En la 10-a numero de decembro 2003, mi aperigis tekston mian sub la titolo «Instige al Mari-Roza: pri diversgrada esperantisteco».

Jen ero de tiu artikolo:

«Eterna komencanto: jen kutima esprimo por ofta esperantisto-speco! Ĉu niaj ĉi-nivelaj samideanoj konscias pri sia feliĉo? [...] Imagu ke iu, eble iuj, pli diligente, serioze, eble eĉ ŝate laboras. Ho, kia riskego! Kio atendas lin/ŝin? Tutcerte oni petos, foje eĉ postulos, ke li/ŝi akceptu respondecon en la movado. Egale ĉu instruanto, kasisto, sekretario, prezidanto. Egale ĉu post tri monatoj au tri jaroj da lernado.»

Kelkaj el vi tutcerte spertis tion, ĉu ne?

Ĉu tio okazis al la kvin personoj, kiuj kunvenis en Hyères sabaton la 29-an de majo?



Mi ne scias, ĉu ili memvole akceptis postenon en la esperanta movado, sed evidentiĝis ke prezidantaro kune promenis kaj ĝuis la retrovitan eblon sidi ĉe teraso de restoracio.

Prezidantaro ? Jes ja, aro da prezidantoj, nunaj aŭ iamaj.

Kuniĝis ja Mari-Roza, iama prezidanto de Esperanto-Aalst (en Belgio), Bruno Flochon, nuna prezidanto de Esperanto-Francio, Thierry, nuna prezidanto de Esperanto-Marsejlo kaj INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista), Christian, kiu ankoraŭ ne prezidis Esperanto-asocion, laŭ mia scio (ni do rapide trovu por li tian postenon!), sed kiu longe prezidis neesperantistan asocion: Williams Sud-Est, kaj mi, iama prezidanto de Esperanto-Dunkirko.

Bone observu niajn vizaĝojn: ĉu ni aspektas malgaje, elĉerpate, deprimate?

Tute ne, male!

### 21-a de junio: komitatkunsido de la Federacio Esperanto-Provenco en La Ciotat

1-a kunsido de la niafederacia komitato depost tiu, kiu okazis en Les Issambres komence de MES 2020!

Urĝis do denove kunveni por zorgado pri kelkaj eroj rilataj al la vivo de nia federacio.

Sen detaligi la tutan tagordon, jen iuj el la pritrakitaj punktoj: starigo de budoj okaze de la septembraj foiroj de asocioj, preparado de la novembra staĝo en Le Beausset, kampanjo "Plantu arbon" (vidu prian artikolon en sekva paĝo), ktp.

Estis decidite ankaŭ ke la ĝenerala membro-kunveno, kiu ne povis okazi en 2021 pro la pandemio, estas prokrastita ĝis la unua dimanĉo de MES 2022.

Kompreneble, ĉiuj eventoj supre aluditaj dependos de la evoluo de la sankrizo.

Mari-Roza, en 2003, respondis al mi en la sama 10-a numero de La Dunkirka Stelo, per artikolo titolita:

«Reage al Pascal: pri diversgrada esperantisteco».

Jen ero de ŝia artikolo:

«Fluparolanto aŭ spertulo: jen esprimo por malpli ofta esperantisto-speco! Imagu, li/ŝi [...] havas rolon en Esperantujo: ĉu instrua (do ade kaj konvinkige semas kaj semas eĉ kiam mil semoj perdiĝas), ĉu varba (memorigante ke eĉ guto malgranda konstante frapante...), ĉu diskoniga, ĉu gvida, ĉu kunlabora... Kia kuraĝo! [...] Do, entute, kiu plej feliĉas? Eterna komencanto aŭ fluparolanto?»

La respondon konas la kvin geamikoj, kiuj pasigis agrablan printempan tagon en Hyères.

Neniu scias nun, kion ni povos aŭ ne organizi post kelkaj monatoj.



### 30-a de junio: Esperanto-kafejo en Hyères



Ĉu estis saĝe proponi renkontiĝon fine de junio?

Post nia Esperanto-kafejo en la centro de Hyères majfine, ni plezure retrovis nian kutiman lokon sur la mirinda tegmento-teraso de la hotelo Ibis.

Nur ses geamikoj kunvenis.

Pri kelkaj fidelaj partoprenantoj en nia ĉiumonata renkontiĝo, ni certis pri neĉeesto: Nicole kaj Pierre, el Le Beausset, prepariĝis por vojaĝi al la Ĝenerala membro-kunveno de Espéranto-info ĉe la ge-Bernard en Lozère; Carmen, el Saint-Raphaël, estis forironta Hispanien kaj Alain, el Toulon, jam estis for por perbicikla vojaĝo tra la tuta Eŭropo. Sed ĉefe ne venis komencantoj, kiuj tamen ĝojis ekscii, ke ni proponas tiun eventon en Hyères. Tio estis antaŭ la pandemio, kaj ni malsukcese provis flegi kontaktojn kun ili dum la sankrizo. Ne venis ankaŭ samideanoj el najbaraj urboj, kun kiuj ni cetere ankoraŭ ne konatiĝis.

Sed laŭ la bone konata eldiro, pli gravas kvalito ol kvanto, ĉu ne?

La grupo de ses geamikoj parolis pri ĉio kaj alio: LME (Le Monde de l'espéranto), la kampajno de UNO/UEA «Plantu arbon», la novembra staĝo en Le Beausset

kun la veno de Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge, la espereble okazonta Mediteranea Esperanto-Semajno, la graveco traduki esperanten ĉefverkojn de la monda literaturo, la Manifesto de Raŭmo, la gestkodo Signuno, bazita sur Esperanto... kaj eĉ pri la ekzisto – aŭ ne – de la tempo...

Do, ĉu estis saĝe proponi renkontiĝon fine de junio? Supozeble jes, ĉar la ĉeestantoj petis, ke ni denove kunvenu juli- kaj aŭgustfine.

**Jean-François Cousineau + fotoj de Paulette**

#### 4 juillet : pique-nique du club de Fréjus - Saint-Raphaël aux Arcs-sur-Argens

La journée s'est présentée sous les meilleurs augures puisque, après trois semaines de grosse et pénible chaleur, enfin, il pleuvait ! (Les nordistes vont me prendre pour un fou !). C'est donc avec une température agréable et une pluie fine que nous nous sommes retrouvés, avec grand bonheur après tant de mois de séparation covidement forcée, chez nos hôtes, Vinko et Marica, sur les hauteurs des Arcs. Correns, Lorgues, Fréjus, Saint-Raphaël, Les Arcs et La Ciotat étaient représentés. Après avoir constaté que le coro-navirus n'avait pas fait de victimes au sein de notre vaillante petite équipe, Paulette, Gérard, Renée, Jean-François, Monique, Pierrot, Marité, Denise, Simone, Carmen, puis Jean-Claude et Thérèse (je vérifie : cela fait bien quatorze, en tout !) se sont installés autour de la grande table dressée sur la terrasse abritée pour l'apéro (Ah, l'excellent kir royal de Vinko et Marica !).



Les discussions, en espéranto, ont abordé différents sujets récurrents, comme par exemple les expériences partagées de l'absence de l'anglais pour communiquer dans des endroits où l'on s'attend à le trouver, la future carte d'identité européenne établie en deux langues (la nationale et l'anglais) alors que le Royaume-Uni s'est exclu de la CE, le vieillissement des troupes locales et l'avenir de l'étoile verte dans la région...

Ensuite, mouvement terrasse-salon pour un pique-nique pantagruélique...



En effet, si chacun avait apporté des victuailles à mettre en commun, Marica et Vinko n'ont pu résister à la tentation de nous faire part de leurs talents culinaires et nous ont, à leur habitude, gâtés.



Bref, ce fut un vrai banquet, au cours duquel l'ambiance fut très détendue, joyeuse et volubile, le français commençant toutefois à s'infiltrer dans les conversations... Mais un petit groupe d'irréductibles veillait et faisait de la résistance ! Au moment du dessert (gâteaux avec coulis de fruits rouges faits maison et savoureuse corbeille de fruits de saison), deux nouveaux *samideanoj* se sont invités via vidéo vision smartphonée : Pascal et Mari-Roza, privés de sortie pour cause de violente réaction de Pascal suite à injection du vaccin anti-Covid... Ce qui, bien sûr, a été à l'origine d'un nouveau (pseudo) débat... Après un tour de table, où chacun a eu tout loisir de converser avec nos amis hyérois, le smartphone a rejoint la poche de sa propriétaire. Le soleil ayant fait sa réapparition (il n'est jamais bien loin en Provence...), nous avons ensuite arpenté le jardin potager (toutefois insuffisant pour faire office de promenade digestive !) et pu apprécier, du même coup, le paysage bucolique et verdoyant qui s'étendait autour de la belle demeure qui nous avait si chaleureusement accueillis.

Bref, ce fut un très bel après-midi de retrouvailles *esperantujesques*...

Merci, Marica et Vinko !

## Vojaĝemaj (kaj laboremaj!) samfederacianoj...

### Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva en Sainte-Énimie (48)

Kiel anoj de la administra konsilio de la asocio Espéranto-info, kiu eldonas sian dumonatan samnoman revuon (printitan je 300 ekzempleroj), Nicole kaj mi ĉeestis en la Ĝenerala membro-kunveno, kiu okazis sabaton la 3an de julio en la asocia sidejo, en «Mas Saint-Chély» (Sainte-Énimie), ĉe Monique Robert kaj Francis Bernard.

Estis granda plezuro revidi la aliajn komitatanojn post unu plena jaro sen veraj renkontiĝoj pro la pandemio!

*raportis Pierre O.*



### Provencanoj en Kastelo Greziljono

La 3-an kaj 4-an de julio okazis en la konata Kulturdomo de Esperanto la **1-a "Festivalo Naturist' por nova mondo"**, kaj poste, de la 5-a ĝis la 9-a, la **2-a Verda Naturisma Semajno**.



Partoprenis pluraj membroj de nia federacio: Chantal Beaumont, Rosy Inaudi, Marc Gallardo kaj Thierry Spanjaard (*videblaj sur la foto - Ĉu iu(j)n mi eble forĝis?*)

Ĉi-okaze, Thierry gvidis unuafoje Esperanto-kurson por komencantoj.

Samloke, Renée Triolle gvidos Esperanto-kurson per babilado pri aktualaj temoj, okaze de la **5-a Maratona Esperanto-kurso**, de vendredo la 23-a de julio ĝis lundo la 2-a de aŭgusto.

### Kuraĝulo... en la tuta Eŭropo

La Tulonano Alain Rémy foriris la 29-an de junio por somera vojaĝo tra pluraj eŭropaj landoj: Francio, Germanio, Belgio, Nederlando, Germanio denove, Aŭstrio, Slovakio, Hungario, Italio kaj ree Francio.

Li planas trovi nian regionon en oktobro.

Li verŝajne renkontiĝos kun esperantistoj kaj havos multon por rakonti postrevne.



### Esperanto-Tago

La journée de l'espéranto a lieu tous les ans dans le monde à l'occasion de l'anniversaire de la parution du premier livre sur l'espéranto, le 26 juillet 1887.



### Kampanjo "Tutmonda Arbo-plantado"

En la revuo Esperanto de novembro 2020, eblis legi pri la kampanjo «Tutmonda Arbo-plantado». Temas pri iniciato, kiu celas planti almenaŭ 1 000 arbojn tra la mondo ĝis la jaro 2030.

En la "Gvidilo al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo de Unuigintaj Nacioj", almenaŭ du celoj rekte rilatas al arbo-plantado. La 13-a: "Urĝe agi por kontraŭbatali klimatsanĝigon kaj ties efikojn", kaj la 15-a: "Protekti, restarigi kaj disvastigi daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastrumi arbarojn, kontraŭbatali dezertiĝon, haltigi kaj inversigi la degeneradon de grundoj kaj haltigi la perdiĝon de biodiverseco".

En la Gvidilo estas informoj pri la celoj kaj sugestoj pri kion fari, ĉu individue, ĉu komunume. Orlando Raola informas pri la "plialtiĝo de la averaĝa temperaturo kiel konsekvenco de la plialtiĝo de koncentriĝo de forcejaj gasoj kaj speciale de karbona dioksido". Li ankaŭ argumentas, ke "la agado por kontraŭbatali klimatsanĝigon devas nepre starti ĉe la komuna intenco eduki homojn".

### Donacalvoko por Kvinpetalo

Avez-vous déjà participé à un stage de Kvinpetalo, à Bouresse, dans la Vienne? Kvinpetalo est le Centre Culturel de stages et d'étude de la Société Yvonne Martinot (SYM), fondé en 1985 avec une riche bibliothèque, une librairie et des archives.

Dès sa création, il a connu un certain succès avec des cours assurés par exemple par Georges Lagrange, Claude Gacond, Katalin Kováts...

Aujourd'hui, ce sont Claude Nourmont et Brian Moon qui gèrent l'organisation des stages. Mais Kvinpetalo vieillit et doit impérativement rénover la toiture des maisons qui le constituent.

### Nova retejo de la Avinjona Esperanto-klubo

Olivier Maury, membro de la asocio, sciigis al ni, ke pro ĉeso de frama.site, la retejo de la Kultura Esperanto-Klubo de Avinjono havas novan adreson: <https://esperanto-avignon.bee.wf/>

Said Pontes, de Albuquerque, asertas, ke "ni, antaŭenigantoj de Esperanto, nature enviciĝas inter tiuj, kiuj rekonas la urĝecon de landaj kaj individuaj iniciatoj por malpliigi la negativajn intervenojn kontraŭ la Naturo" kaj invitas nin "planti arbojn, renovigi la naturon, purigi la ĉirkaŭaĵon, kune kun niaj samideanoj".

Certe, Tutmonda Arbo-plantado, kiel agado, ne nur helpas kompensi karbondioksidon, sed ankaŭ helpas eduki homojn. Kiel diris Fernando Maia Jr., prezentante la kampanjon, "ni rezistu, ni venku, ni supere floru kiel movado, kiel socio, kiel homaro. La arboj estos, por tio, portantoj de nia simbolo de rezisto kaj espero".

Plantu aŭ plantigu arbon en via loĝregiono aŭ okaze de iu evento; sendu fotojn kaj informojn de tiu agado al Fernando Maia Jr. (fmaiajr@gmail.com), Normand Fleury (normandfleury@gmail.com) kaj al la redakcio de la revuo Esperanto: [redakcio@revuoesperanto.org](mailto:redakcio@revuoesperanto.org) Donacu al nova Fondaĵo Klimato.

Subtenu UEA per membriĝo: [uea.org/alighoj/alighilo](http://uea.org/alighoj/alighilo).

*Eroj el teksto de Rafael Lima*

La Société Yvonne Martinot fait donc appel à la générosité des espérantistes avec un appel aux dons par l'intermédiaire du site Halloasso.

Voici le lien pour votre éventuelle contribution: <https://www.helloasso.com/associations/societe-yvonne-martinot>





**Pluraj tekstoj de membroj de nia federacio estis publikigitaj en konataj Esperanto-revuoj (sekvo)**



Post la artikoloj skribitaj por Monato de Marc Gallardo, en la numero de marto 2021, kaj de Thierry Spanjaard, en tiu de aprilo, (vidu en la numero 124 de Esperanto-Provence), jen plia teksto, ĉifoje de Pascal Vilain, en la julia numero: "Ĉu iu ajn rajtas traduki ies ajn verkon".

Temas pri skandala rifuzo de poemtraduko, pretekste ke la verkistino estas nigrulino kaj la tradukistino blankhaŭta, kaj ke nur juna nigrulino rajtas traduki verkon de alia juna nigrulino.

**Federacioj skribas... por sia nura plezuro... (sekvo)**

*Kvankam Korsiko ne estas parto de nia regiono PACA, Roger Siarri, sola konata esperantisto sur sia insulo (eble estas aliaj, ĉu iu havas priajn informojn?), aniĝas jam de longe kaj regule al nia Provenca federacio.*

*Roger estas verkema kaj regule sendas siajn kontribuojn al la revuo "La KancerKliniko". Jen unu el ili.*

**Roger Siarri (Korsiko - L'Île Rousse)**

**Senluziigo en la Paradizo**

Iu itala laboristo, loĝanta en la cirkaŭaĵo de Romo, dum sia tuta vivo honeste kondukis, kaj li estis la plej laborema el ĉiuj siaj samvilaĝanoj.

Li longatempe sonĝis pri la posedo de eta aŭtomobilo, sed ve! La mono, kiun li pene perlaboris, ne sufiĉis por efektiviĝi lian pasion.

Je la fino de sia vivo, kiam li sufiĉe ŝvite ŝparintis monon, li finfine aĉetis etan Fiat-on, kaj li vere fieris posedi tian trezoron. Li pasigis la tutan tagon ĝin admirante, lavante, ŝmirante, kvazaŭ ĝi estus la plej granda mirindaĵo en la mondo. Neniam en la ĉirkaŭaĵo oni vidis tian pasion! Eĉ ne por liaj familianoj.

Bedaŭrinde, iun tagon, nia heroo forlasis tiun valon plenan de larmoj kaj, ĉar li estis senpeka kristano, li rekte flugis al la Paradizo.

Li frapis ĉe la pordo de la domo de la Plejaltulo, kaj baldaŭ li aŭdis knaradon en la seruro. La pordo malfermiĝis kaj olda blanka longbarbulo, kun aŭreolo surkape, aperis kun ŝlosilaro ĉemane. Li estis la titulara pordisto, Sankta Petro mem.

- Bonan tagon, Via Sankta Moŝto – diris la noval-

veninto – mi ĵus forlasis la terglobon, kaj jen mi alvenas rekte en la Dian Ĉielon, por eterne adori la Plej Sanktulon.

- Saluton, sinjoro eksterano, bonvolu eniri, por ke vi genuiĝu ĉe la piedoj de la Kreinto de la Universo, kaj ke vi ĉiumomente laŭdu lian Sanktecon.

- Mi multe dankas, Via Ekscelenco, sed mi devas konfesi al vi, ke mi tiom amas mian karan aŭton Fiat, ke mi ege dezirus eniri en la Paradizon kun ĝi. Tial mi petas de vi la favoron retroiri sur la Teron, por preni mian aŭton, kaj tuj reveni kun ĝi en Vian Sanktejon.

- Vi komplete frenezas! De kiam do oni alvenas en la Dian Hejmon kun sia veturilo?

- Ha, Ega Sanktulo, mi tiel bone kondukis surtere! Mi tiom bruligis kandelojn en la paroĥo de mia vilago, honore al la Alta Dio, al lia Eminentia Filo kaj ties patrino, la Sankta Virgulino! Lasu min reiri sur la terglobon por repreni mian Fiat-on, kaj mi ĵuras al Vi, ke mi farigos eta-eta en la Paradizo, nur rigardante mian etan karulinon, kaj kompreneble laŭdante por eterne la gloron de Dio.

La interparolo daŭris longatempe. La kamparano tiom insistis, ke Sankta Petro, tute elĉerpita, finfine permesis al nia ĵus mortinta amiko reflugi sur la Teron por preni la tiel amatan veturilon, kaj eniri kun ĝi en iun kvietan lokon en la Paradizon.

Je tiu momento, kun strida bruego kaj laŭtaj huposonoj, rapidege alvenis ega ruĝebrila Ferrari-aŭtomobilo, enmatrikuligita NA, stirite de ia hipia, barba kaj longhara junulo, proksimume 33-jara, surhavanta orajn okulvitrojn, kaj fumanta dikan cigaron. Apud li troviĝis ĉirkaŭbrakitaj kaj ekscese ŝminkitaj junaj belaj virinoj, pli similaj al luksaj ĉiesulinoj ol al naivaj virgulinoj. Ĉiuj distrompetadis laŭtvoĉe obscenajn kantojn, kiuj ruĝigus la plej diboĉemulinojn sur la Tero. La Ferrari pasis fulmrapide, kun surdiga tondra oreŝira rokmuziko. Nia povra novalveninta italo preskaŭ duan fojon mortis pro tiu furioza veturilo.

- Ha, Via Sankta Moŝto, Vi tiel longe kontraŭstaris por permesi al mi eniri, kun mia eta Fiat, enmatrikuligita RO en Romo, en la Paradizon! Kaj Vi lasas en la Dia Hejmo tiun frenezulon, kun la luksa Ferrari, enmatrikuligita NA en Napolo! Plie, tiu demenca diboĉulo ege malfamigas la Dian prestiĝon!

- Mia amiko, malgaje rebatis la blanka barbulo, ĉi tie ne temas pri la sama afero. Unue, ne estas Napolo sed Nazareth. Due, la junulo, kiun vi ĵus vidis, estas la filo de la Patrono!

*Se ankaŭ vi estas skribema... se vi verkas poemojn, novelojn, eseojn, romanojn... ne hezitu sendi ilin al la redaktoro (ret- kaj poŝt-adresoj en la kolofono unuapaĝe)*



## Provencaj esprimas sin... pentre aŭ fote... (sekvo)

*Pluraj membroj aŭ apogantoj de nia federacio havas artan talenton. Ili estis petitaj prezenti sin kaj siajn verkojn. Se ankaŭ vi havas arttalenton kaj ŝatus konigi ĝin, ne hezitu kontakti la redaktoron (kontaktingformoj unuapaĝe).*

### **Bernard Briançon (Espéranto-Le Beausset)**

Mi estas artisto, kies arto, diversforma, baziĝas sur interŝanĝo kaj aŭskultado. Gluaĵoj, pentraĵoj, tekstoj, fotoj aŭ objektoj igas la komponaĵojn poeziaj kaj ludaj universetoj. Devojigo, reuzocelo aŭ reciklado estas por mi iloj por esprimi pensojn pri la nuna stato de la mondo.

Mi praktikas Esperanton en la klubo Espéranto-Le Beausset.

Instruanto en la altlernejo pri artoj kaj dezajno Marseille-Méditerranée, mi proponas al miaj lernantoj iniciadon al la plej nunaj artaj praktikoj, tamen ne neglektante la tradiciajn teknikojn de desegnado kaj pentrado.



por scii pli  
pri la laboro  
de Bernard,  
vizitu lian retejon  
[ĉi tie](#)





## ***Pierre Oliva (Espéranto-Le Beausset)***

Mi ne estas vera pentristo sed ŝatas vojaĝi, kaj mi ĉiam volas konservi enmemore tion, kion mi rigardas. Pejzaĝojn mi oftege fotas.

Iam, mi forgesis kunporti mian fotilon. Mi do aĉetis farbokraĵojn por anstataŭigi ĝin. Por la sekvaj vojaĝoj, mi kunportis tubojn da oleofarboj.

Mi tuj malkovris diferencon inter fotado kaj pentrado. Por foti, mi zorgas multe pli pri la formo de la kadro kaj por pentri, mi rapide komprenis, ke tion, kion mi vidas, mi devas reinventi nur per koloroj.

Tiam mi bezonis trovi atelieron por lerni diversajn teknikojn, nepraĵn por esprimi miajn sentojn per koloroj kaj nuancoj, kaj por konservi bonan memoron pri miaj vojaĝoj.

Jen kial mi pentras.



*Dunoj ĉe Bajkalo*



*Adamo kaj Evo*



*Islando*

*n.d.l.r. : Venos aliaj prezentoj de artistoj kaj ties verkoj en la sekva(j) numero(j) de nia gazeto.*

*Kompreneble, estas facile por mi aperigi tekstojn kaj bildojn.*

*Pli malfacilas prezenti sondokumentojn, sed tion mi povus fari per retligiloj.*

*Do, se estas inter vi muzikistoj, kanzonistoj, kantistoj, ĥorestroj, deklamistoj... kaj se eblas ie sur la reto spekti pecojn de via laboro, ankaŭ vi estas bonvenaj ĉi tie.*



## ZEO-oj en Regiono "SUD / PACA" > 11 - Manosque (04)

En la antaŭa numero de nia gazeto, mi skribis, ke miaj petoj al esperantistoj de Manosque, pri la ZEO-oj en ilia urbo, restis vanaj. Nu... tuj reagis José Grammatico, kiu sendis al mi plurajn fotojn. Dankegon al li!

Jen kion mesaĝis al mi José G.

"Kiam estis donita la nomo "Rue Louis-Lazare Zamenhof" al vojo de nia urbo?

Mi ne bone scias !

Jen kio okazis:

Mi petis pri tio la urbestron la 14-an de marto 2007 .

La urba "Commission de Dénomination des Voies" konsentis la 26-an de aprilo 2007 (sen informi min).

Instalo de la stratplato la 22-an de majo 2007.

Nur hazarde mi vidis ĝin!

Mi dankis la urbestron la 3-an de januaro 2008.

Inaŭguro ne okazis.

Iom poste estis kreita bushaltejo "Zamenhof"."



8-an kaj 9-an de majo 2010  
federacia kongreso  
komuna foto ĉe la stratplato Zamenhof



José G. staras tute maldekstre



bushaltejo Zamenhof

## Esperanto-poŝtkruciĝo

Du membroj de nia federacio, Paulette Chiarisoli, el Correns, kaj Pascal Vilain, el Hyères, partoprenas en ĉiumonata **Esperanto-Poŝtkruciĝo**.

Jen pri kio temas:

"Esperanto-Poŝtkruciĝo invitas vin partopreni interŝanĝon de poŝtkartoj kun esperantistoj el diversaj landoj kaj regionoj. Aligŭ, se plezurigus vin elektadi plaĉan bildkarton kaj surskribi ĝin mane, per simpla skribilo. Kaj poste trovi en via poŝtkesto bildkarton de iu el ie kun amika mesaĝo en Esperanto!"

Se ankaŭ vi ŝatus ricevi bildkartojn senditajn de esperantistoj el la tuta mondo, kaj viavice sendi ĉiumonate la vian, [vidu ĉi-tie la aligŭon](#).



## Paĝo de la komencantoj

*n.d.l.r.: Dum mi skribas ĉi tiun rubrikon, laŭdire okazas "UEFA Euro 2021", la Eŭropa Futbal-Ĉampionado.*

*Ha, ĉu vere? Mi ne certas, ke mi aŭdis pri tiu evento!*

*Mi ja povus esti la ĉefa rolanto de la sekva rakonteto.*

*Same kiel Jana, mi ne bone komprenas la regulojn de sporto, kies nura mirindaĵo estas la ekstravaganca hararanĝo de iuj ludantoj.*

*(Hmm... ĉu venkos Francio?)*

Jana neniam spektis futbalmatĉon<sup>1</sup>.

Ŝia frato foje invitis ŝin iri kun li en stadionon por rigardi matĉon.

Post la fino de la sporta konkurso, la frato demandis, ĉu tio plaĉis al ŝi.

- Tre plaĉis al mi ĉio, sed nur ion mi ne bone komprenis: kial oni donis al 22 homoj nur unu pilkon?

Ĉu ne eblis doni al la ludantoj po unu pilkon<sup>2</sup>, por ke ili povu trankvile ludi?

### Klarigoj

#### 1 : vortkombino: futbalo + matĉo

La vorto "futbalo" estas ofte uzata kaj verŝajne ofte komprenebla, sed estas ankaŭ sinonimo pli internacia, "piedpilkado".

Same okazas kun la vorto "matĉo" (aŭ "maĉo"), kiu havas pli internaciajn sinonimojn: ludo, konkurso, renkonto.

Do, "futbalmatĉo" povas esti ankaŭ "piedpilkrenkonto" aŭ "piedpilko-konkurso".

#### 2 : doni al la ludantoj po unu pilkon

"La préposition *po* devant un nom de mesure signifie que cette mesure se rapporte, non pas à toutes les personnes ou à tous les objets ensemble, mais à chacun d'eux en particulier."

*(Lingva respondo n° 137, de Zamenhof)*

Remarque: La préposition *po* est en relation avec le seul numéral qui suit (*unu*). Il est donc logique d'ajouter le *n* de l'accusatif à *pilko*,: *doni al la ludantoj pilkon, po unu*. Mais on rencontre aussi ce genre de phrase sans l'accusatif.



**Plurelekta demandaro**  
*laŭ verkoj de Robert Llorens eldonitaj de Esperanto-Info*

#### 1 - gramatika

a) Ĝis ..... vi restados en Anglujo?

1 - kie ; 2 - kiom ; 3 - kiam

b) Kiam vi kredos min ..... tio, kion mi diras al vi?

1 - por ; 2 - pri ; 3 - de

c) La preleganto parolis ..... la esperantistoj pri Zamenhof.

1 - al ; 2 - pri ; 3 - de

#### 2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "barilo", "stirilo" aŭ "streko" por traduki la francan "barre"

1 - trait (dessin) : .....

2 - de tribunal : .....

3 - de gouvernail : .....

d) elektu "bati", "draŝi" aŭ "pulsi" por traduki la francan "battre"

1 - le grain : .....

2 - le cœur : .....

3 - les artères : .....



**Superzam'**  
*proponita de Jean-François Cousineau*

**1. En kioma jaro okazis la 1a Amerika Universala Kongreso?**

a- 1910 b- 1915 c- 1920

**2. Kiu verkis la novelaron "Koloroj" en 1962?**

a- Baghy b- Waringhien c- Szilagy

**3. En kiu muzikgrupo kune muzikis Anki, Marita, Marian kaj Nanne?**

a- Kapriolo b- Kaj Tiel Plu c- Kajto

**4. Kio estis la antaŭnomo de la patro de Zamenhof?**

a- Adam b- Jozef c- Markus

**5. Kiu korelativa ekaĵo signas negativecon?**

a- i b- ĉ c- nen

**6. Kiu estas la plej loĝata lando en Afriko (2012)?**

a- Egiptio b- Etiopio c- Niĝerio

### Plurelekta demandaro

#### 1 - gramatika

a: 3 ; b: 1 ; c: 2

#### 2 - vorto-trezora

ĉ1: pesilo ; ĉ2: naso ; ĉ3: bilanco

d1: banderolo ; d2: bendo ; d3: bando

**Solvoj de la demandoj  
en EP 124  
printempo 2021**

### Superzam'

1 c > 1965

2 b > Baghy ; 3 a > Masko

4 c > Bjalistoko ; 5 b > Ĉ

6 a > Alĝerio (2,4 Mkm<sup>2</sup>)



## À noter sur votre agenda

Dans les n<sup>os</sup> 121, 122, 123 et 124, il était écrit ici-même que la crise sanitaire était toujours d'actualité et qu'il ne fallait pas écarter la possibilité d'une nouvelle vague d'attaque virale accompagnée d'une nouvelle période de confinement. Eh bien rien n'a changé, nous en sommes toujours là, et les dates indiquées ci-dessous ne le sont toujours qu'à titre indicatif.

### dans notre fédération

**1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille**

Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes

4 square Stalingrad, 13001 Marseille

**dernier mercredi de chaque mois - 16 h - Hyères**

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare

45 rue Edith Cavell (face à la gare)

**septembre - forums des associations**

**11** : La Ciotat

**12** : Marseille

**?** : Saint-Raphaël

**novembre 27-28 - Le Beausset**

Stage de fin de semaine organisé par la fédération avec l'aide du club local

### en France

*pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs pour savoir si la programmation est maintenue.*

**Baugé (49) - Château de Grésillon**

<http://gresillon.org/?lang=fr>

**Bouresse (86) - Kvinpetalo**

<http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

### en Europe

**août 20-27 - Assise (Italie)**

87e congrès italien d'espéranto

<https://kongreso.esperanto.it/88/>

### congrès virtuels

**juillet 17-24 - sur Internet**

106e Congrès international d'UEA

[2-a Virtuala Kongreso de Esperanto](#)

**juillet 25/août 1- sur Internet (et aussi à Bialystok ?)**

94e Congrès de SAT (Le congrès des 100 ans !)

<https://sat.bialystok.pl>

**juillet 26/août 1 - sur Internet**

Congrès international de la jeunesse (TEJO)

<https://ijk2021.tejo.org/>

**août 7-14 - sur Internet**

54e congrès de ILEI, la Ligue internationale des professeurs d'espéranto

<https://www.ilei.info/>

Vous trouverez aussi la liste de nombreux événements, virtuels ou réels, sur le très bon site [eventa servo](#)



*Aedes volapikus*

# Dengo

Ĉu dengo estas besto?  
Ripetu ĉiuj! **Ĉu dengo estas besto?**  
Ne, dengo ne estas besto.

...

Cseh-metodo, leciono 183

Dengo efektive ne estas besto. Dengo estas malsano, kiun la homoj ricevas de kuloj, kiuj portas la viruson. Fakte ekzistas kvar diversaj virusoj, kiuj estigas kvar malsamajn formojn de dengo. La sama homo povas suferi je tiuj kvar formoj, tio signifas, ke la sama persono povas esti kvarfoje malsana.

En Reunio tiu viruso prosperas! De la 1-a de Januaro 2021, pli ol 9700 personoj estis malsanaj. La kazoj ne ĉiam estas gravaj, sed tamen unu el dek malsanuloj devis iri al la hospitalo.

Kiam oni havas tiun malsanon, oni estas tre laca, oni havas febron kaj la artikoj fariĝas dolorigaj kaj malflekseblaj. La malsano daŭras dek tagojn, sed poste oni restas laca dum pluraj semajnoj.

La plej gravaj kazoj povas esti mortigaj. En Reunio, de la 1-a de Januaro 2021, 5 personoj mortis pro dengo.

## Kiel sin protekti?

Ne ekzistas vakcino.

La malsano estas disvastigata de la kuloj. La plej efika metodo estas do sin gardi de la kuloj, per kulvualoj kaj forpelaj produktoj. Kaj la urbaj servoj disŝprucigas kulmortigajn produktojn. Eĉ okazis nova eksperimento: sciencistoj liberigis en la naturon sterilajn kulojn. Tiel oni esperas, ke la nombro de kuloj malaltiĝos.

En nia apartamento ni pendigis kulvualojn antaŭ ĉiu fenestro kaj pordo. Kaj ni etendis belan vualon super nia lito.

Kiam Maggy ĝardenumas, ŝi devas surhavi dikan pantalonon (ĉar la kuloj trapikas la teksaĵojn), ŝtrumpojn kaj longajn manikojn.

Ekzistas specialaj kaptiloj por mortigi kulojn, sed bedaŭrinde ili ne estas vendataj ĉi tie.



*Aedes albopictus*, kiu inokulas la viruson de dengo.



Kulvualo.

Maggy kaj Philippe Combot